

Kurso pri tradukado al kaj el Esperanto gvidata de Claude Piron
en Kultura Centro Esperantista, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 620, 1975.08.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni raportis pri la disvolviĝo en la urbo La Chaux-de-Fonds kadre de la starigata Internacia Feria Altlernejo de tradukkurso, kiun gvidis s-ro Claude Piron. Ni promesis raporti pri la enhavo de la lekcioj.

A.- La unuajn lekciojn s-ro Piron dediĉis al teoriaj klarigoj kaj ekzercoj stilaj. Jen resumo de lia instruo, kiu disvolviĝis en etoso sprita.

Cl.- Oni devas distingi inter la arto traduki, tio estas transdoni tekston skribe, kaj la arto interpreti, agado parola. Ni lernis nur traduki.

A.- Bona tradukisto rezignas je la propra personeco. Li respektas en la plej fajnaj detaloj la tekston originalan. Ofte la virinoj pli lertas en la arto traduki, ol la viroj, verŝajne ĉar ili pli facile kapablas sekvi la penson kaj esprim-manieron de la aŭtoro, ol la viraj kolegoj.

Cl.- Kvar faktoroj karakterizas la tradukarton : la respekto de la senco, de la tono, de la stilo kaj de la emfazo. Jen kelkaj klarigoj tiurilate :

A.- Respekto de la senco : tradukisto devas konscii, ke al la vortoj de unu lingvo respondas en la tradukita teksto vortoj, kies signifo ne ĉiam havas saman vastecon. Ekzakta traduko ekzistas, kiam al la signifo en unu lingvo paralelas en la alia lingvo signifo egalvalora. Tio estas malofte ebla. Pro tio multaj tradukistoj rezignas vere traduki, ili reverkas en alian lingvon novan tekston, kiu ofte ege malsimilas al la originala. Sed la kontraŭo ekzistas. La franca poeto Baudelaire tradukis Edgar Poe preskaŭ laŭvorte.

Cl.- Ni lernis esprimi ideon multmaniere kaj poste elekti la solvojn, kiuj plej ekzakte paralelis al la frazo ricevita. Mire ni malkovris, ke la simpla frazo « *Mi pensas, ke li pravas.* » povas esti dirita multmaniere. Mi donu ekzemplojn : « *Mi opinias, ke li pravas. Mi opinias lin prava. Laŭ mi li pravas. Laŭ mi li estas prava. Mi estas konvinkita, ke li pravas. Mia konvinko estas, ke li estas prava. Mi pensas, ke lia opinio estas konforma al la vero. Mia opinie li pravas. Mi rigardas lin prava. Kaj tiel plu, kaj tiel plu.* »

A.- Ni neniam antaŭe imagis, ke simplan francan frazon oni povas redoni en Esperanto per 40 malsimilaj manieroj. Tio por ni estis vera malkovro.

Cl.- En la tradukoj oni devas respekti la tonon, tio estas : la apartan etoson de la donita frazo. Traduki vorton, kies ofteco estas granda en la franca per neologismo en Esperanto, estas malrespekto de la tono. Ĝenerale la esperantistoj, kiuj tradukas, nur atentis al la transkribo de la senco. Ni lernis ĉiam atenti pri la ofteco de la vortoj por trovi ekvivalentan oftecon en Esperanto.

A.- La stilo estas alia afero. En la franca la substantivoj kaj ties akompanantoj havas pli da ofteco, ol en Esperanto, kie la verbo estas la ĉefa elemento. Ni lernis uzi multe pli da verboj, ol ni faris ĝis nun. Ni ankaŭ lernis pli variigi la vortordon kaj eviti, ke ĉiuj frazoj havu la

saman gramatikan konstruon. Tiurilate zamenhofaj modeloj, kiujn ni provis retrovi, estis tre instruaj.

Cl.- Fine la emfazo estas la respekto de la nuancoj propraj al aŭtoro aŭ teksto. Kelkaj vortkonstruoj, kiuj altiras la atenton, reliefigas elementon, kiu en la originalo estis banala. Tio estas evitenda. Oni serĉu alian manieron transskribi la formon originalan.

A.- Iom post iom, dum la diskuto de la traduk-ekzercoj, ni konstatis, ke en Esperanto ne devas abundi la pasivaj formoj, kiel en la franca. Stilo estas flua, se oni respektas la spiriton de la lingvo. Tion ofte ne komprenis la esperantsistoj, kiuj tradukis. Atenta studo de frazkonstruoj ĉe Zamenhof, Privat, Schwartz, Sinha, Baghy kaj aliaj verkistoj instruas multon. Ni konsciu, ke tre ofte Kalocsay ne respektis la tonon de la originalo. Meti rimojn al poemoj, kies originalo tion ne posedas, estas malrespekto de la tono. Uzi neologismojn por traduki vortojn, kies ofteco estas tre granda, estas alia grava traduka peko.

Cl.- La lastajn tagojn ni komencis paroli pri la tempoj. Tro da franclingvanoj ne kapablas pensi rekte en Esperanto, tial en iliaj tekstoj verbfinaĵoj ofte estas eraraj.

A.- Tutcerte tia kurso pri la tradukarto estas ripetenda. Ni jam anoncas, ke la venontan jaron, ankaŭ en la monato julio, disvolviĝos tradukkurso samnivela al tiu, pri kiu ni ĵus raportis. Ĝia gvidanto refoje estos s-ro Claude Piron. Se vi havas intereson por tiu kurso, sendu kiel eble plej rapide vian aliĝon, ĉar nur 9 personojn oni povos akcepti.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!